

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №2



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2024. №2 (320)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2024

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2024, №2 (320).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 6 июля 2024 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Eventoj	5
Joël Fontaine. Eŭropa Kongreso: Dialogo inter eŭropaj popoloj	6
Frédéric Gilles. Opinio de unuafojulo.....	7
Léa Gavaille. Multlingve en Prago.....	8
Dennis Keefe. Esperanto-Plaĝo: Longa, Intensa, tute Esperanta	10
Povilas Jegorovas. Vytenis Andriukaitis: Esperantisto en la Eŭropa Parlamento	15
Peter Zilvar, Harald Mantz. Federacia Meritkruco por Zsófia Kóródy	17
Maurizio Giacometto. Oksfordo: la centra etapo de la Festjaro Bauldton.....	18
Alfons Tur. Jubilea kongreso de Kataluna esperantistaro	21
Gražina Opuskienė. Printempa kunflugo en Litovio.....	22
Héloïse Lellouche. IJF-47: La pontoj trans la montoj	24
Tiina Oittinen. Somera kurso en Tampere	26
Sukcesa redebuto de Danuba Esperanto-Rendevuo	27
Ana Alebić-Juretić. PRINTEMPaS en Greziljono	28
Michel Basso. Giganta benko en Alzaco	29
Laurent Vignaud. Esperanto en Angers jam 120-jara.....	30
Lars Sözüer. Sur du radoj ĉe la Balta Maro	31
Ulrich Matthias. Krakovo valoris vojaĝon.....	32
Katalin Kováts. La ekzamenretejo edukado.net estas ALTE-taksita.....	33
Retaj KER-ekzamenoj de 2024	34
Prakash Ghimire. Nova estraro en Nepalo	35
Xie Ruifeng. Seminario sur la monto Suxian	36
Nia literaturo influe reprezentita en Slovenio.....	37
La gajnintoj de la konkurso “Partoprenu IJK-n 2024”	37
Mulele Mbassa Makaranga. Intensiva kurso en Tanzanio	38
La 2a Afrika Kongreso de Virinoj en Aruŝo	38
767 aliĝoj al UK-109: Aruŝo superis Bonaeron!.....	39
KAEST 2024 okazos en Slovakio.....	40
Simpozio kun Esperanto kiel unu el la laborlingvoj	40
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Aleksej Korĵenkov. Petro Čeliaskas forpasis.....	41
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	42
Tribuno	43
Duncan Charters. Strategia laborplano – ĉu resumebla?	44
Renato Corsetti. Labor-plano, planoj kaj laboroj.....	46
Renato Corsetti. Aperi aŭ malaperi, – tiel staras nun la demando.....	49

Renato Corsetti. Ne al flug-roboto sangon soifanta: Esperanto-tago, la 26a de julio 2024.	51
Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Esperanto.	52
Mesaĝo de UEA al UN okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, la 20a junio	53
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. 1600+ tagoj da konstanta ĉiutaga informado.	54
François Lo Jacomo. Danci por la paco.	55
Arkivo	56
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2024.	57
Marc Vanden Bempt. Internacia Esperanto-Arkivo.	60
Stanislav Belov. La vivo de Mateo Gagarin: de kortego ĝis eŝafodo.	61
Kulturo	71
Aleksander Korĵenkov. Ne nur <i>La majstro kaj Margarita</i>	72
Miĥail Bulgakov. La ruĝa krono. La ĥana fajro. La blizardo. Estis majo (Trad. Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova, Vladimir Vyĉegĵanin)	73
Paulo Sérgio Viana. Kvar preĝvendredoj.	106
Miguel Fernández. Nuntempa galega poezio: Claudio Rodríguez Fer.	109
Claudio Rodríguez Fer. Poemoj (Trad. Miguel Fernández)	111
Probal Dasgupta. Romio antaŭ Julio (Recenzo: William Shakespeare. <i>Koriolano</i>).	115
Wolfgang Kirschstein. Ne malatentu ĉi poeton (Recenzo: Benoît Philippe. <i>espero fola</i>)	121
<i>Rimletoj</i> : Jubilea reldono	123
<i>Matilda</i> aperis en Esperanto	123
Lu Wunsch-Rolshoven. Nova libro de Etsuo Miyoshi senkoste en Esperanto .	124
Floréal Martorell, Aleksander Korĵenkov. <i>Dezertoj</i> : La dua bitalbumo de Armel Amiot.	125
Floréal Martorell. Nova bitalbumo de Martin & la talpoj.	126
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako, 2023, N°49</i>	127
Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> : Edukado en la epoko de artefarita intelekto.	128
<i>Literatura Foiro, 2024, N°328</i>	129
<i>Literatura Foiro, 2024, N°329</i>	130
Mozaiko	131
Stanislav Belov. Aĥ, tiuj (mal)riĉuloj	132
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.	133
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	134

Kovropaĝe: Somera pentraĵo de Arkadij Plastov (1893-1972) kun la senpretenda titolo “Somere” (1954). Ĉu vi jam plukis fungojn ĉi-sezone?

Eventoj



La Eŭropa Esperanto-Kongreso, kiun en majo akceptis Strasburgo, estis surprize amasa, programriĉa kaj eĉ belvetera. Se vi ne partoprenis, kredis la partoprenintojn.

Eŭropa Kongreso: Dialogo inter eŭropaj popoloj

Eŭropa Esperanto-Kongreso 2024 okazis de la 8a ĝis la 12a de majo en la Strasburga Universitato, kie antaŭ 55 jaroj okazis germana-franca Esperanto-kongreso.

Ĝi estis organizita de Espéranto-France (Unuiĝo Franca por Esperanto) kaj Germana Esperanto-Asocio, kun la partopreno de asocioj de aliaj landoj: Belgio, Italio, Svislando. Kunsidis samtempe ankaŭ Internacia Federacio de Esperantaj Fervojoj, Eŭropa Esperanto-Unio, Junulara Esperanta Asocio, Asocio de Verdaj Skoltj. Aliĝis 570 homoj el 35 landoj. La plej multnombraj estis francoj (213), germanoj (162), belgoj (31), italoj (20), nederlandanoj (18), poloj (19), rumanoj (11), svisoj (9). La Universala Esperanto-Asocio estis reprezentata de ĝia prezidanto Duncan Charters kaj de pluraj membroj de ĝia estraro.

La kongreso integriĝis en du pli ĝeneralaj eventoj: “Strasburgo, tutmonda ĉefurbo de libro 2024” kaj la “monato de Eŭropo”, organizitaj de la loka registaro.

La temo de la kongreso estis “Dialogo inter eŭropaj popoloj, portanto de paco”. Inter la deko da paralelaj programeroj pluraj prelegoj kaj diskuttrondoj estis dediĉitaj al la temo de paco. Mireille Grosjean gvidis debaton pri fruktodonaj paccelaj aktivecoj en Eŭropo.

Deko da ekskursoj en la urbo kaj al diversaj vidindaĵoj de la regiono estis proponitaj.

Rilate al lingvoinstruado, okazis kursoj de diversaj niveloj. Pluraj sesioj estis dediĉitaj al la preparado de ekzamenoj laŭ la Eŭropa referenca kadro por lingvoj. Katalin Kováts gvidis la preparadon.



Foto: Joël Fontaine

Pluraj esperantaj artistoj venis al Strasburgo por distri la kongresanojn: Gijom Armid, Klarisa, Jonny M., *Kajto*, *Inicialoj d. c.*, TIM, Ralph Glomp.

Ankaŭ kontribuis al la sukceso de la kongreso la tre bela vetero kiu daŭris la tutan semajnon.

Joël Fontaine

Opinio de unuafojulo

Estis la unua fojo, ke mi partoprenis Esperantan kongreson fizike. Ĉeestis 600 partoprenantoj, kaj mi konis neniun krom la marsejlanoj Renée, Thierry kaj Marc. Mi ankaŭ unuafoje renkontiĝis kun Marta el Italio, kiu estis en mia pasinta reta grupo de Esperanto.

La kongreso konsistis el pluraj prelegoj, ludoj, laborgrupoj, renkontiĝoj, ekskursoj kaj koncertoj.

Mi partoprenis en la prelego de Renée Triolle pri Lidja Zamenhof. La ĉambro estis plena. Kelkaj homoj eĉ sidis sur la planko. Mi ankaŭ partoprenis informan kunsidon pri KER-ekzameno kun Katalin Kováts kaj la prelegon de Bernard Pidancier pri abeloj. Ĝi estis tre interesa, kaj mi lernis multajn Esperantajn vortojn. Evento, kiun mi tre ŝatas, estis la paroliga ludo “100 paŝoj por vortemuloj” kun Sylvain Le-large.

En la konferencejo estis libroservo kun centoj da libroj en Esperanto. Mi aĉetis kelkajn.

Ekster la konferencejo, okazis pluraj ekskursoj :

- Vizito de la katedralo de Strasburgo kun ĝia fama astronomia horloĝo, kiu sonorilas ĉiun kvaronon de horo.
- Ekskurso al la monto Sankta Odilio, kaj vizito de muzeo de mielkuko, kaj vizito de la urbo Obernai.
- Ŝippromenado en “muŝoboato” sur la rivero Ill. La ŝipo kunportis nin tra diversaj kvartaloj de Strasburgo: la Eta Francio, la Eŭropa Parlamento. Ni iris kaj reiris tra kluzoj.

Dum la vesperoj okazis koncertoj. Ĉar estis tro da homoj por eniri la koncertejon, ni devis elekti inter du sesioj: je la 8a, aŭ je la 10a vespere. La pliparto de la kantoj estis en Esperanto. Mi tre ŝatis la kantistinon, kiu ludis harpon, kaj kantis en ses lingvoj.

Oni ne povas eliri Strasburgon sen gustumi la lokajn manĝojn “Tarte flambée” kaj “Choucroute”.

Mi tre ĝuis tiun semajnon. Mi renkontiĝis kaj interparolis kun multaj homoj de pluraj landoj: Italio, Germanio, Nederlando, Belgio, Latvio, Israelo, Hispanio, Hungario. Ĉiam en Esperanto.

Mi antaŭĝojas partopreni venontajn kongresojn.

Frédéric Gilles



Multlingve en Prago

La 15-19an de majo Prago gastigis la 9an Poliglota Renkontiĝon, kiu okazis en la ekonomika universitato (VŠE). Dum kvin tagoj la partoprenantoj povis ĉeesti kaj ĝui diversajn prelegojn, atelierojn kaj aliajn programerojn ĉirkaŭ lingvoj kaj kulturoj.

Kaj nun, ni lasu paroli la ciferojn: 811 aliĝintoj (duoble pli ol lastjare), el 83 landoj, pli ol 30 organizantoj kaj helpantoj

Ŭaŭ, kia granda evento! Ĉu vi povas paroli pli pri ĝi? — La 15an de majo la unuaj lingvemuloj alvenis kaj komencis konatiĝi kun la aliaj aŭ trovi amikojn ĝis vespero. Poste oficiale komenciĝis la evento per la malferma ceremonio kiun gvidis Petro Baláŝ, sub centoj da brilaj kaj feliĉaj okuloj. Post belaj bonvenigaj vortoj, necesis malsekigi gorĝojn. Ni ĉiuj iris al granda trinkejo por daŭre babili kaj interkonatiĝi, antaŭ ol iri dormi kaj ripozi por la sekva tago.

La unuaj programeroj komenciĝis je la 9a matene por la plej matenaj birdoj, kaj ĉiuhore la partoprenantoj povis elekti inter almenaŭ tri programeroj. Eblis ankaŭ promeni, ripozi, babili ĉe la lingvaj tabloj kie oni povis praktiki lingvojn, plibonigi siajn nivelojn, konatiĝi kun novaj homoj kaj pli. Inter ĉiuj programeroj, ni povis ŝargi niajn bateriojn kaj batali kontraŭ laceco trinkante kafon aŭ teon.

Sed, pri kio temis? — Estis pluraj tipoj de programeroj. Sed ĝenerale ĉio rilatis al lingvoj.

Dum prelegoj, oni prezentis ĝenerale dum 45 minutoj iun temon rilate al lingvoj. Povis esti, ekzemple, prezento de lingvo, gvido de persona motivo, prezentado pri propraj spertoj... Per la aplikaĵo Slido, la partoprenantoj povis fari demandojn, al kiuj la preleganto povis respondi post sia prezentado.

Dum intensaj kursoj eblis rapide lerni bazojn de iu lingvo, havi konsilojn pri kiel bone komenci lerni tiun lingvon, kaj ankaŭ trovi aliajn komencantojn por lerni kune.

Dum atelieroj estis pli interagaj. Ĉiuj povis praktiki kaj partopreni. Estis ankaŭ okazo prezenti siajn kompetentojn, konojn kaj talentojn:

Dum la talenta spektaklo (Talent show), estis la momento por ĉiuj, kiuj aliĝis antaŭe prezenti sian talenton. Kaj mi atestas: paroli dekojn da lingvoj ne estas la nura talento de poliglotoj; multaj scias kanti, danci, ĵongli, fari muzikon... (sed ankaŭ forgesi siajn nomŝildojn kaj perdi aĵojn).

Dum fulmaj prezentoj (Lightning talks) partoprenantoj povis dum maksimume kvin minutoj prezenti ĉion, kion ili volis. Povis esti spertoj pri vojaĝoj, laboroj, rilato kun lingvoj, aŭ io ajn pri kio ili interesiĝas. Kредu min, ili havas multajn aŭskultindajn spertojn.

Estis ankaŭ organizita lingva defio (Language challenge). La celo? Eklerni lingvon dum 50 tagoj antaŭ la evento. Oni povis elekti inter la ĉeĥa kaj Esperanto (aŭ ambaŭ), kaj montri siajn progresojn dum la evento tra neoficiala “ekzameno”.

La plejparto de tiuj programeroj estis en la angla ĉar, kvankam ni scias ke Esperanto estas la plej taŭga lingvo, pro internacia kompreno, ni elektis la anglan kiel “komunan lingvon” (kiu scias, eble post du-tri jaroj, ĉiuj tie parolos Esperanton).

Sed... ĉu nenio okazis vespere? — Poliglotoj estas sufiĉe proksimaj al esperantistoj, jes ja okazis programeroj vespere. Kaj kiaj programeroj! Ni ne parolos pri la “Disco party”, kiu finfine okazis... sen muziko, sed tio ne bremsis homojn, kiuj tamen festis kune. Krome, okazis du plurlingvaj koncertoj en la universitato. Olga kaj Kaŝi ofertis belajn kaj dancigajn momentojn! Ni ankaŭ rondvojaĝis tra pluraj landoj dum la kulinara festivalo (klare estis la trinko-manĝa nokto, oni nur ŝanĝis la nomon), sed ankaŭ dum la muzika lingva kvizo. La poliglota ekspozicio estis okazo por partoprenantoj prezenti siajn artojn, firmaojn, aplikaĵojn... Kaj kompreneble, ĉiuvespere okazis neoficialaj programeroj, plejofte en trinkejoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vytenis Andriukaitis: Esperantisto en la Eŭropa Parlamento

La 9an de junio 2024 en Litovio okazis elektoj al la Eŭropa Parlamento. Konforme al la kvanto da loĝantoj Litovio havas 11 lokojn en ĉi tiu grava Eŭropa instanco. La balotado okazas laŭ partiaj listoj. En la elektoj konkurencis 15 partiaj listoj. En la listo de Litovia Socialdemokrata Partio sub la numero kvar estis konata litova kaj Eŭropa politikisto kaj esperantisto Vytenis Andriukaitis. Ĉi tiu partio en la Eŭropaj elektoj gajnis nur du lokojn. Tamen Vytenis Andriukaitis fare de elektantoj estis prioritatigita en la listo kaj aperis sub la numero 2. Tiamaniere li estis elektita al la Eŭropa Parlamento nome de Litovio.



Vytenis Andriukaitis nun estas la plej altranga politikisto, kiu estante esperantisto aktive subtenas la Esperanto-movadon en Eŭropo. Li lernis Esperanton en 1976, kiam li laboris kiel kirurgo en hospitalo de la urbo Ignalina, proksime de Vilno. Foje li rakontis, ke dum noktaj deĵoroj en la hospitalo, kiam mankis konkreta laboro, li aŭtodidakte studis Esperanton. Tio estis lia protesto kontraŭ la rusigado de ĉiuj vivoflankoj de Litovio en Sovetunio. Al Esperanto lin logis Viktoras Kutorga, medicinisto, esperantisto kaj konvinkita socialdemokrato.

De tiam Vytenis Andriukaitis sufiĉe diligente vizitadis kunvenojn de Vilna Esperanto-klubo, gvidata ankaŭ de medicinisto kaj elstara esperantisto Adomas Vaitilavičius. Poste, dum la aktiva agado por la sendependeco de Litovio li iĝis tre aktiva socialdemokrato kaj iom deflankiĝis de Esperanto, tamen li neniam forgesis ĝin kaj, kiam li povis, helpis la esperantistojn.

Vytenis Povilas Andriukaitis naskiĝis en 1951 en Siberia ekzilo, lia familio revenis al Litovio en 1958. Dum 1969-75 li studis medicinon en Kaŭna Medicina Instituto, dum 1979-84 en Vilna Universitato li foreste studis historion; laboris kiel kirurgo en Ignalina, Kaŭno kaj Vilno.

Andriukaitis aktive partoprenis en la kontraŭsovetia sendependiga movado de Litovio, unue kaŝe, poste oficiale. En 1990 li estis elektita kiel parlamentano de Litovio, kaj restis parlamentano ĝis septembro 2014 (escepte de 2004-08), dum 2000-04 li estis vicprezidanto de la Litovia parlamento. Dum 2012-14 li estis ministro pri sanprotektado de Litovio. En 1999-2001 li estis prezidanto de Litovia Socialdemokrata Partio. Nuntempe li estas Honora Prezidanto de tiu partio.

Ekde 2014 li estis membro de la Eŭropa Komisiono (la registaro de Eŭropo), kiel reprezentanto de Litovio. En la Eŭropa Komisiono li respondecis pri sano kaj

sekureco de nutraĵoj. Post la kvinjara deĵoro en tiu grava posteno ĝis nun li estis speciala sendito de Monda Organizo pri Sano en Eŭropo.

Dum lia laboro en la Litovia parlamento mi kelkfoje renkontiĝis kun li, ĉefe pro la organizaj aferoj de la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno (2005). En 1996 li kun du aliaj parlamentanoj, esperantistoj Meĉislovas Treinys kaj Antanas Račas, akceptis la prezidanton de UEA prof. Lee Chong-Yeong. En 1998 dum BET-34 en Veisiejai li, kiel parlamentano, partoprenis la inaŭguron de la impona monumento al Ludoviko Zamenhof.

Krom en Esperanto kaj en la litova, Andriukaitis parolas pole, angle, ruse kaj germane. Li estas edziĝinta kaj havas tri infanojn. Li estas dekorita per kelkaj gravaj ordenoj kaj medaloj.

Laborante en Eŭropa Komisiono, Andriukaitis helpe de mi kontaktis gvidantojn de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj dum kelkaj jaroj kun ili fruktodone kunlaboras.

En 2016 li partoprenis en la lingvo-politika konferenco “Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio”, okazinta en Nitra (Slovakio) samtempe kun la 101a UK, kaj faris ĉefparoladon en Esperanto. En sia parolado li nomis Esperanton simbolo de humanismo kaj demokratio (legu ĉe <https://sezonoj.ru/2017/06/andriukaitis-2/>).

En 2017 li partoprenis en la komuna kongreso de EEU kaj Germana Esperanto-Asocio en Freiburg (Germanio) kaj ankaŭ tie li faris ĉefparoladon en Esperanto “Zamenhof kiel antaŭulo de homaj rajtoj”. En ambaŭ paroladoj Vytenis Andriukaitis emfazis la rolon de Esperanto en konservado de paco kaj en problemaro de homaj rajtoj. Lian paroladon en Freiburg la Eŭropa novaĵportalo “Politico” agnoskis kiel la paroladon de la semajno. Liaj paroladoj en Esperanto iĝis la unuaj Esperanto-tekstoj, aperintaj en la oficiala retejo de la Eŭropa Komisiono. Tiuj paroladoj aperis ankaŭ en la angla, franca kaj germana lingvoj.

En 2017 al Vytenis Andriukaitis estis atribuita honora membreco en EEU. En la 103a Universala Kongreso de Esperanto (Lisbono, 2018) la Komitato de UEA elektis lin membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Reprezentanto de Litovio la unuan fojon aperis en tiom alta honora pozicio de UEA.

En 2019 li aktive helpis kaj subtenis la 55ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn en Panevėžys.

Nun post lia elektiĝo al la Eŭropa Parlamento, EEU kaj UEA havas bonajn eblojn kunlabori kun li en la Eŭropa kaj tutmonda nivelo.

Povilas Jegorovas

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Renato Corsetti ĉi-foje kontribuis al nia “Tribuno” per tri artikoloj, en kiuj li proponas multajn ideojn. Kiujn el ili akceptos nia parolkomunumo?..

Strategia laborplanado – ĉu resumebla?

Dum niaj diskutoj pri strategiaj planoj de UEA, ofte esprimiĝis la deziro de koncizeco: eĉ, “ĉar evidentiĝis ke neniu legas 34-paĝan, eĉ 16-paĝan laborplanon, ĝi estu nepre sur unu sola paĝo!”

Por provi kontentigi la unupaĝulojn, mi ĉi tie faras provon, malneton, por stimuli viajn reagojn. Ni efektive staras nun en la momento de kunigo de rezultoj de la dumkongresaj kaj aliforumaj diskutoj kaj enketado, por ke povu prezentiĝi nova plano antaŭ la UK okazonta en Aruŝo. Simile mallonga (1-3 paĝoj), sed kun suplementoj por konkretigi la necesajn agad-detalojn.

VIZIO

Esperanto-komunumo kiu videble vivas en konkordo kun siaj idealoj kiel komunika modelo.

Mondo de respekto al lingvaj rajtoj kaj diverseco de kulturoj, al kiu Esperanto kontribuas per agnoskata sukceso en antaŭenigo de interkompreniĝo celanta pacan progreson de la homaro.

MISIO

Konsciigi la publikon kaj decidofarantojn pri la logiko kaj valoro de Esperanto kiel instrumento de edukado al kunlaborema mondo, celanta problemsolvadon per justa kaj efika komunikado.

VALOROJ

Niaj valoroj spegulu la plej altajn universalajn aspirojn de la homaro: Amo, Vero, Justeco, Libereco, Unueco, Toleremo, Respondeco, Respekto al la vivo; kaj kunlaboradon kun ĉiuj progresemaĵoj, bonintencaĵoj kaj individuoj strebantaj por tiujn apliki en homaj rilatoj.

NIAJ STRATEGIAJ KOLONOJ – KIRI

Plej multaj el la jenaj proponoj estas jam iniciatitaj.

1. Kunlaborado

Ni faciligu kunlaboradon inter esperantistoj per la jenaj rimedoj:

– Modernigita retejo por aŭtomatigi administrajn kaj financajn procedurojn, faciligi servojn al la membroj per provizo de necesaj kontaktoj, materialoj, mendiloj, aliĝiloj, membrecorenovigoj.

– Trijara Almanako reta kaj presita por kunigi ĉiujn necesajn informojn pri la Asocio, ĝiaj Landaj Asocioj kaj reprezentantoj, kunlaborantaj partneroj, agadraportoj, estontaj planoj.

– Trejni laŭbezone por pli efika laboro (konfliktsolvado, konsilejo: mediaciado? ombudsmano?).

– Doni pli da subteno al Landaj Asocioj kaj kuraĝigi al pli da interasocia kunagado.

- Krei komisionojn portempajn kaj longdaŭrajn por atingi difinitajn celojn.
- Atentigadi pri la neceso kunlaborigi malsamcelajn individuojn por realigi komunajn projektojn.

2. Informado kaj komunikado

– Organizati sub la gvido de komisiito de UEA laborgrupojn kun grupestroj kaj membroj dediĉitaj al la antaŭenigo de la diversaj flankoj de informado: retejo esperanto.net; utiligo de eventoj kiel kongresoj por diskonigi Esperanton (gvidilo, trejnado); amaskomunikiloj (trejnado por kontaktoj kaj intervjuoj, preparo de materialoj); sociaj retoj (oportuneco de agado, komunikado); respondoj al kritikoj kaj misprezentoj (help-dokumentoj, reaga teamo); kontaktoj al opinigvidantoj (politikistoj, ĵurnalistoj, edukistoj); konstanta fluo de bultenoj aŭ gazetaraj komunikoj kiuj celu eksterajn informfontojn, ne nur la internajn de UEA.

- Plifortigo de interna komunikado de UEA al membroj kaj partneraj asocioj.

3. Rilatoj kun la ekstera mondo

– Daŭrigi subtenon de oficejoj kaj agado ĉe UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

– Subteni CED kaj ESF en la daŭra organizado de konferencoj, simpozioj, seminarioj kiuj helpas al niaj partneroj atentigi pri lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio, solvoj por komunikaj problemoj.

– Kuraĝigi esperantistojn al aktiva engaĝiĝo kun lokaj asocioj havantaj mondan perspektivon.

– Organizati kaj prepariĝi por peti agnoskon de Esperanto (Esperanto-tago, asembleoj de UN, Unesko, kaj iliaj neregistaraj organizaĵoj [NROj], parlamentoj).

– Diskonigi kaj kuraĝigi al partopreno esperantistajn kaj interesantajn esploristojn en konferencoj, eldonprojektoj.

– Proponi al aliaj asocioj servojn kiujn ni kapablas liveri per niaj transnaciaj kontaktoj.

4. Instruado

– Kunlabori kun ILEI por helpi realigi ĝiajn celojn rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj.

– Subteni la laboron de edukado.net kaj la KER-ekzamenoj por kvalifiki instruistojn.

– Kuraĝigi al subvencipetado por helpi lernejojn kaj edukajn instancojn atingi siajn celojn uzante Esperanton kiel instrumenton por transnacia interkompreniĝo.

– Subteni projektojn kiel la 30 Oraj Horoj kaj la Multlingva Akcelilo por progresi al organizitaj internaciaj eksperimentoj pri la valoro de Esperanto kiel eduka instrumento, faciliganta lingvolernadon kaj transkulturalan interkomprenon inter samaĝaj lernejoj.

Duncan Charters
prezidanto de UEA

Labor-plano, planoj kaj laboroj

Dankon, *Ondo*, pro tio, ke vi reaperigis la artikolon de Duncan Charters pri la labor-plano de UEA. Mia ĝenerala ideo estas, ke, se oni ne havas ion konkretan por fari, oni povas tre longe debati pri la unuopaj vortumoj. Mi mem preferus alian pli mallongan version, kiun mi prezentas ĉi-sube, sed samtempe mi diras, ke ĝenerale la plano estas akceptebla kun kelkaj modifoj, sed tio ne estas la ĉefa problemo. La ĉefa fakto estas, ke ĝi aperis post longa atendado kaj nun oni ĉesu paroli pri ĝi kaj ekiru al apliko.

Ĉiuokaze jen la versio, kiun mi mem preferas, sed ĝi estas samvalora kiel aliaj versioj:

MISIO

Konsciigi la publikon kaj decido-farantojn pri la logiko kaj valoro de Esperanto kiel instrumento de edukado al kunlaborema mondo, celanta problem-solvadon per justa kaj efika komunikado.

ANIAJ STRATEGIAJ KOLONOJ – IRIK

1. Informado kaj komunikado

– Organizi sub la gvido de estrarano de UEA pri informado laborgrupojn kun grupestroj kaj membroj dediĉitaj al la antaŭenigo de la diversaj flankoj de informado: retejo esperanto.net; utiligo de eventoj kiel kongresoj por diskonigi Esperanton (gvidilo, trejnado); amaskomunikiloj (trejnado por kontaktoj kaj intervjuoj, preparo de materialoj);

– Sociaj retoj (oportuneco de agado, komunikado); respondoj al kritikoj kaj misprezentoj (help-dokumento, reaga teamo); kontaktoj al opinigvidantoj (politikistoj, ĵurnalistoj, edukistoj); konstanta fluo de bultenoj aŭ gazetaraj komunikoj kiuj celu eksterajn informfontojn, ne nur la internajn de UEA.

2. Rilatoj kun la ekstera mondo

– Daŭrigi subtenon de oficejoj kaj agado ĉe UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

– Subteni CED kaj ESF en la daŭra organizado de konferencoj, simpozioj, seminarioj kiuj helpas al niaj partneroj atentigi pri lingvaj rajtoj, lingva diskriminacio, solvoj por komunikaj problemoj.

– Kuraĝigi esperantistojn al aktiva engaĝiĝo kun lokaj asocioj havantaj mondan perspektivon.

– Organizigi kaj prepariĝi por peti agnoskon de Esperanto (Esperanto-Tago, asembleoj de UN, Unesko, kaj iliaj neregistaraj organizaĵoj [NRO], parlamentoj).

– Diskonigi kaj kuraĝigi al partopreno esperantistajn kaj interesantajn esplorstojn en konferencoj, eldonprojektoj.

3. Instruado

– Kunlabori kun ILEI por helpi realigi ĝiajn celojn rilate instruadon de Esperanto en la lernejoj.

– Subteni la laboron de edukado.net kaj la KER-ekzamenoj por kvalifiki instruistojn.

– Kuraĝigi al subvencipetado por helpi lernejojn kaj edukajn instancojn atingi siajn celojn uzante Esperanton kiel instrumenton por transnacia interkompreniĝo.

– Subteni projektojn kiel la 30 Oraj Horoj kaj la Multlingva Akcelilo por progresi al organizitaj internaciaj eksperimentoj pri la valoro de Esperanto kiel eduka instrumento, faciliganta lingvolernadon kaj transkulturan interkomprenon inter samaĝaj lernejoj.

4. Kunlaborado

Ni faciligu kunlaboradon inter esperantistoj per la jenaj rimedoj:

– Modernigita retejo por aŭtomatigi administrajn kaj financajn procedurojn, faciligi servojn al la membroj per provizo de necesaj kontaktoj, materialoj, mendiloj, aliĝiloj, membreco-renovigoj.

– Trijara Almanako reta kaj presita por kunigi ĉiujn necesajn informojn pri la Asocio, ĝiaj Landaj Asocioj kaj reprezentantoj, kunlaborantaj partneroj, agadraportoj, estontaj planoj.

– Doni pli da subteno al Landaj Asocioj kaj kuraĝigi al pli da interasocia kunagado.

– Krei komisionojn portempajn kaj longdaŭrajn por atingi difinitajn celojn.

– Atentigadi pri la neceso kunlaborigi malsamcelajn individuojn por realigi komunajn projektojn.

PLANOJ

Nun ni bezonas eklabori laŭ la plano aperigita de Duncan aŭ laŭ mia plano, kaj por fari tion ni bezonas havi kvar unupaĝajn subplanojn pri la unuopaj punktoj.

Informado. Tio prezentas grandajn problemojn, ĉar de la fino de la pasinta jarcento UEA ĉesis okupiĝi pri informado, ne la membroj, kiuj en siaj urboj daŭre produktis Esperanto-stratojn, sed la centraj fortaj povoj, kaj do nun repreni la aferon estos aparte malfacile. Oni povus re-ek-iri de www.esperanto.net, kiu devis esti la juvelo en ĉi tiu kampo kaj povus ankoraŭ esti kun iom da polurado. La gvido devus esti “Se homoĵ ne lernas Esperanton, ĉio cetera estas senutila”.

Rilatoj. Tio prezentas malpli da problemoj, laŭ mi, kaj ni devus peti la reprezentantojn ĉe UN kaj Unesco kaj ESF kaj CED redakti tiun unupaĝan planon.

Instruado. Ankoraŭ pli facile. Ĉar UEA transdonis instruadon al ILEI, ni simple petu ILEI-n produkti tiun unupaĝan planon, sen revoj sed kun konkrete atingeblaj celoj.

Kunlaborado. Tio estas tre malfacila. Sub tiu vorto kaŝiĝas la reorganizo de la Centra Oficejo de UEA en la nuna reta mondo. Iam la Centra Oficejo de UEA estis unu el la bazaj elementoj de la Esperanto-Movado. Ĝi faris ĉion, sciis ĉion, respondis al ĉiuj petoj el ĉiuj anguloj de la mondo kaj ne havis komputilojn. Ĝi faris tion

per homoj kaj homa inteligento. Nun tio ne plu eblas, ĉar oni devas uzi komputilojn kaj artefaritan inteligenton. Sed eĉ la artefarita inteligento atentus la ordonon: “La Esperanto-movado estas unu kaj UEA estas ĝia centro”, se iu donus ĝin. Post tio oni povas reorganizi la oficejon rete kaj malcentre kun oficistoj unu en Kanado kaj unu en Japanujo, sed kunordigataj de reta superĝenerala direktoro. Eliri el tiu kaĉo ne estos facila, sed la estraro varbu la konsilojn de la konsilemaj komitatanoj kaj ne igu la komisionanojn foriri pro laciĝo.

LABOROJ

Atendinte dum kvin jaroj ĉi tiun paĝon, nun estus donkiĥote plenumi la laboron en unu jaro, sed ni komencu por lasi al la posta estraro kadron jam ekfunkciintan.

Mi mem pretas redakti la subplanon por informado kunlabore kun ĉiuj interes-igantoj kaj mi pretas funkcii kiel sekretario de Duncan por kolekti la konsilojn kaj la helpojn por pluredakti la subplanojn kaj por trovi laborantojn pri ili.

Kaj jen la vera mesaĝo de ĉi tiu artikolo: se vi pensas, ke vi povas esti taŭgaj kandidatoj por la venonta estraro de UEA, kontaktu min. UEA bezonas kuraĝulojn, kiuj konsentas pri la misio kaj pretas labori por ĝi.

Kontaktu min ankaŭ se vi pensas, ke vi ŝatus kunlabori en unu el la kreataj labor-grupoj pri la kvar punktoj.

Renato Corsetti

renato.corsetti@gmail.com

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Antaŭ iom pli ol tri jarcentoj en Ruslando aperis gubernioj kaj guberniestroj. Konatiĝu kun la zigzaga sorto de Mateo Gagarin, la unua Siberia guberniestro, kies rezidejo estis Tobolsko. (Atentu, ke sur la supra mapo de Tobolsko, farita de Semjon Remezov en 1701, nordo estas ne supre, sed maldekstre.)

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2024

5. Antaŭ 165 jaroj naskiĝis **Alfred Michaux** (miŝó, 1859-1901-1937), franca advokato, interlingvisto kaj esperantisto; iniciatoro kaj vicprezidanto de la unua UK (Bulonjo-ĉe-Maró, 1905), defonda membro de Lingva Komitato (1905-14), redaktoro de *La Revue de l'Espéranto* (1903-06); aŭtoro de *Nouvelle méthode pour apprendre seul l'Espéranto* (kun P. Boulet, 1905), *Evolucio libera aŭ Akademio* (1908), *Romanal – metode de international lingue* (1909), *Étude des projets soumis à l'Academia pro Interlingua sur la langue universelle: Esperanto, Ido, Latino, Romanal* (1912), *Une langue internationale anglo-latine "Le Romanal"* (1917), *Romanal: Langue auxiliaire Anglo-Latine: Étude de langue internationale* (1922). En 1911 Michaux forlasis Esperanton proteste kontraŭ maldemokratia gvidado de la Esperanto-movado kaj okupiĝis pri sia projekto Romanal.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 199-200).

5. Antaŭ 175 jaroj naskiĝis **William Thomas Stead** (stid, 1849-1912), angla ĵurnalisto, filantropo, pacifisto kaj esperantisto; li aktive disvastigis Eon en la Esperanto-rubriko de sia revuo *The Review of Reviews* kaj disponigis sian oficejon por BEA, kies vicprezidanto li estis; Stead pereis en la katastrofo de la ŝipego "Titanic" en 1912.

12. Antaŭ 35 jaroj mortis **Miyamoto Masao** (1913-1934-1989), japana socia aganto kaj esperantisto, la plej konata japana Esperanto-literaturisto, aŭtoro/tradukinto de pli ol 20 libroj en/pri Esperanto, i.a.: *Pri arto kaj morto* (novelaro, 1967), *Invit' al japanesko* (poemaro, 1971) kaj *Sarkasme kaj entuziasme* (esearo, 1979); kvar liaj tradukoj el la japana literaturo aperis en la libroserio "Oriento-Okcidento": *Rakontoj* de Mori Oogai (Nº2), *Kvin virinoj de amoro* de Ihara Saikaku (Nº7), *El la vivo de Syunkin* de Tanizaki Jun'ichirō (Nº9), *Loulan kaj Fremdregionano* de Yasushi Inoue (Nº20); laŭreato de kvin premioj kaj tri honoraj mencioj en la Belartaj Konkursoj de UEA; membro de la Akademio de Esperanto (1986-89), honora membro de UEA (1984).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 204-206).

14. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Marin Vjekoslav Ivan Gjivoje** (1919-1936-1982), kroata jugoslavia ĵurnalisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Marinko Ĝivoje; redaktoro de *La Suda Stelo* (1950-57), *Jugoslavia Esperantisto* (1957-60),

Jugoslavia Fervojisto (1963-64), gvidanto de la gazetara servo de UK (1953-73); aŭtoro de *Kroatoserba-Esperanta vortaro* (1966), *Esperantonimoj* (1973), *Panorama de Esperanta literaturo* (1979), *Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj* (1980), *Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj* (1985) k. a.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 119-120).

16. Antaŭ 50 jaroj mortis **Sándor Szathmári** (sátmari, 1897-1911-1974), hungara maŝinprojektisto, verkisto kaj esperantisto; afergvida prezidanto de HES (1937-42); aŭtoro de la romano *Vojaĝo al Kazohinio* (1958, en 1941 ĝi aperis hungarlingve), *Maŝinmondo kaj aliaj noveloj* (1964), *Kain kaj Abel* (posteume: 1977) kaj *Perfekta civitano* (posteume: 1988); tradukinto al la hungara de la romano *Kredu min, sinjorino!* de C. Rossetti (1958). Lia romano *Vojaĝo al Kazohinio* estas unu el la plej gravaj Esperantaj beletraĵoj, pri kiu K. Kalocsay skribis: "La libro estas insida. Formetinte ĝin, vi ne liberiĝos de ĝi; vi sentos, ke ĝi lasis en vi hoketojn de problemoj".

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 271-272).

19. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Eugène Aristide Alfred Adam** (1879-1914-1947), franca metiisto, fakinstruisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Eŭgeno Lanti; la ĉefa figuro en la intermilita laborista Esperanto-movado, iniciatoro kaj gvidanto de SAT (1921-33), redaktoro de *Sennacieca Revuo* (1921-24) kaj *Sennaciulo* (1926-28), kreinto de sennaciismo (1931), iniciatinto de *Plena Vortaro de Esperanto* (1930), aŭtoro de la studoj *For la neŭtralismon!* (1922), *La laborista esperantismo* (1928), *Manifesto de la sennaciistoj* (1931), *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?* (kun R. Guihéneuf, 1935) kaj aliaj verkoj; tradukinto de *Kandido* de Voltero (1920).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 166-168).

19. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Johannes Rijk Gerardus Isbrücker** (1889-1909-1967), nederlanda elektroteknikisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Jan Isbrucker; pioniro de la uzado de Esperanto en radio, komitatano (1925-36) kaj vicprezidanto (1934-36) de UEA, membro de la Lingva Komitato (1921-48) kaj Akademio de Esperanto (1922-67), la plej longtempa prezidanto de Akademio de Esperanto (1937-63), aŭtoro de *La evoluo de la telefonio* (1928), *Historio kaj organizo de la Esperanto-movado* (1932), *Pri la vortfarado en Esperanto* (1959) k. a., honora membro de UEA (1934).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 138-139).

26. Antaŭ 137 jaroj (1887) en la presejo de Ĥaim Kelter (Varsovio) aperis la “**Unua Libro**” de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof – la naskiĝdato de Esperanto.

• Legu pli en la artikolo *La unua libro* de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2020/07/unua>.

27. Antaŭ 50 jaroj (1974) en Hamburgo komenciĝis la **59a Universala Kongreso de Esperanto**, kadre de kiu okazis la demisio de Ivo Lapenna el ĉiuj siaj oficoj en UEA pro la t. n. “Hamburga puĉo”.

28. Antaŭ 25 jaroj mortis **Ĥristo Marinov Iskrov** (1908-1925-1999), pli konata kiel Ĥristo Gorov, bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, partia, socia kaj ŝtata funkciulo kaj esperantisto; prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio (1960-64, 1976-87), komitatano de UEA (1977-89); aŭtoro de *Poemo de l’ plugisto* (1930), *Ĉe abismo* (1932), *Du frontoj* (1932), *Ribela kordo* (1983), *Mia verda pado* (1986); tradukinto de verkoj de Ĥ. Botev, J. Jovkov, G. Karaslavov, Ĥ. Smirnenski kaj aliaj bulgaraj aŭtoroj, kompilinto de kelkaj antologioj en Esperanto; honora membro de UEA (1999).

31. Antaŭ 25 jaroj (1999) en Berlino komenciĝis la **84a Universala Kongreso de Esperanto** – la unua UK en la reunuigita Germanio.

Aleksander Korĵenkov

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La vivo de Mateo Gagarin: de kortego ĝis eŝafodo

Eseo de Stanislav Belov

Ni ne scias, kiel li aspektis – la senkompata tempo postlasis neniun lian portreton. Historiistoj ĝis nun diskutas, ĉu oni akuzis lin juste aŭ ne. Nur pri unu afero mankas duboj – la kruela kaj bonkora, monavida kaj neimageble malavara, fluginta ĝis la pinto de la povo por ŝtone fali en abismon – li estis la unua. La unua guberniestro de Siberio, princo Mateo Gagarin (Матвей Петрович Гагарин).

Vojevodo

La gubernioj kaj guberniestroj aperis en Ruslando relative malfrue – nur antaŭ tri jarcentoj, kio malmultas por la pli ol miljara rusa historio. Antaŭ la administra reformo de Petro la Granda en 1708 la superaj potenculoj surloke estis vojevodoj. Inter ili estis ankaŭ Mateo Gagarin, kiu apartenis al unu el la dek kvar malnovaj aristokrataj familioj de la Rurika dinastio¹.

Ni ne scias, kiam ĝuste naskiĝis Mateo Gagarin (1658 aŭ 1659), sed en 1691 li servis kiel viculo de la vojevodo en Irkutsko, kiu laŭ tiama kutimo estis lia frato. En 1692 Mateo Gagarin estis nomumita vojevodo de la urbo Dauri (nun Nerĉinsk), kie li servis ĝis 1695. Tiutempe en lia vivo okazis la unua granda skandalo, kiu iom fuŝis la sukcesan karieron. En 1696 laŭ ukazo de la caro komenciĝis enketado pri misuzado de la ofico fare de la fratoj en la profitega komerco kun Ĉinio.

En la tiama Ruslando oni ne ŝatis hasti. Pridemandado de komercistoj daŭris tri jarojn. Nur en 1699 surloken venis enketa komisiono sub la gvido de Danila Polanskiĝ². Li arestis la fratojn Gagarin kaj konfiskis ilian havaĵon por la ŝtato.

Sed post malpli ol unu jaro Polanskiĝ mem estis akuzita je misuzado de sia ofico kaj revokita al la ĉefurbo. Poste oni provis rekomenci la enketadon, sed evidente sen granda sukceso. Baldaŭ Mateo Gagarin eĉ ricevis novan, tre gravan postenon el la manoj de Petro la Granda.

Konstruigisto kaj juĝisto

Petro la Granda speciale ŝatis la maron kaj ĉion ligitan al ĝi – ŝipojn, havenojn, varfojn. Transformado de Ruslando al mara imperio estis unu el la kernaj ideoj de liaj reformoj. Des pli honora estis la tasko, ricevita de la princo en 1701.

Post la konkero de la urbo Azov de la turkoj (julio 1696) la caro decidis konekti per reto de kanaloj Volgon kaj Donon, kaj interligi la Baltan, Kaspian kaj Nigran marojn. Gvidi ĉi tiun laboron li ordonis al Mateo Gagarin. La afero progresis, kaj printempe 1707 la unuaj 300 ŝipoj sukcese trapasis 24 kluzojn, konstruitajn sub la gvido de la energia princo.

Talentaj administrantoj ĉiam malmultas. En 1706 li iĝis “juĝisto” (tio estas estro) de la Siberia departemento, kiu okupiĝis pri la aferoj de tiu ĉi fora, sed riĉa provinco. En tiu posteno li interalie estris ankaŭ la Armilan Ĉambron, kiu respondecis pri armilproduktado.

En la Moskva kremlo



La sekva, 1707a jaro alportis al Ruslando pliajn zorgojn kaj al la agema princo – novan postenon. Daŭris la Granda Norda milito (1700-21). Aperis informoj ke la sveda reĝo Karolo la 12a planas sendi siajn trupojn tra Pollando al Moskvo. Necesis urĝe aranĝi defendon de la ĉefurbo kaj denove oni taskigis pri tio Mateon Gagarin, kiu aldone al siaj jamaj postenoj iĝas komandanto de Moskvo.

Li agis rapide kaj rezolute. Interalie li ordonis soldatigi rusajn servistojn de ĉiuj eksterlandanoj en Moskvo. En la Germana kvartalo (tiam en Ruslando oni ĉiujn eŭropanojn nomis *germano*) li ordonis preni po unu homo de ĉiuj tri domoj kaj sendi ilin al konstruado de fortikaĵoj. Multaj denuncoj kaj plendoj venis, sed la caro subtenis sian fidelan asistanton. En tiu tempo la estonta guberniestro unuafoje okupiĝis pri enloĝigo kaj provizado de la svedaj militkaptitoj, kiujn li baldaŭ renkontos denove, jam en Siberio.


Rimarkindas ke dum la tritaga festeno de la venko ĉe Poltavo, en julio 1709 en Moskvo okazis du solenaj bankedoj – ĉe la carido Aleksio Petroviĉ kaj ĉe princo Mateo Gagarin. La malavara Moskva komandanto ordonis surtabligi por la popolo multajn barelojn da vino kaj vodko kaj abundajn manĝaĵojn. Ĝuste en tiu tempo la princo amikiĝis kun Aleksandro Menŝikov, favorato de la caro. Tiu ligo baldaŭ donos bonajn fruktojn.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



“Komence nenio okazis: la flamo ŝrumpis kaj malaperis, sed poste ĝi subite elsaltis kaj anhelante batis supren tiel, ke Tugaj nur pene sukcesis forsalti. Post minuto la baldakeno ekbrulis, kaj tuj la tuta tendo, ĝis la lasta polvo, jubile eklumis”.

(Miĥail Bulgakov. *La ĥana fajro*)

Ne nur *La majstro kaj Margarita*

La deka aŭtoro en nia ciklo estas Miĥail Bulgakov, kies romanon *La majstro kaj Margarita* (MkM) daŭre esploras rus- kaj alilandaj fakuloj pri literaturo, teatro, teologio, filozofio, historio kaj aliaj fakoj. La polemikon pri liaj verkoj kaj ideoj, akcelis la nova filmversio de MkM, premiere prezentita komence de 2024. Sed li verkis ne nur ĉi tiun romanon...

Miĥail Afanásjeviĉ Bulgakov (Булгakov, 1891-1940) naskiĝis en Kievo, kiel la unua el la sep infanoj en la familio de profesoro de Kieva rusortodoksa akademio Afanasij Bulgakov kaj gimnazia instruistino Varvara Bulgakova (fraŭline: Pokrovskaja). Post la gimnazio Miĥail studentigis en la medicina fakultato de la Kieva universitato kaj en 1916 ricevis kuracistan diplomon, laboris kiel kuracisto en la imperiestra armeo, en zemstva malsanulejo, en kelkaj blankarmeaj strukturoj kaj en Norda Kaŭkazo. En 1921 la 30-jara Bulgakov ekloĝis en Moskvo, vivtenante sin per verkado de felietonoj, humuraĵoj kaj beletraĵoj.

Inter liaj verkoj estas kelkaj romanoj, romanetoj kaj dramoj; inter la lastaj estis *La tagoj de Turbinoj* (1925), teatra adaptaĵo de la romano *La blanka gvardio* (1923). La ĉiopova Stalin nomis ĝin “kontraŭsoveta aĵo”, sed plurfoje (almenaŭ 15-foje) kun plezuro spektis ĝin en MĤAT kaj ordonis restarigi ĝin post la malpermeso.

“Diri la veron estas facile kaj agrable”, – diris Jeŝuo en MkM (ĉap. 2), kaj Bulgakov, kiu plej alte taksis en la homo honeston, honoron kaj dignon, ne povis eviti kolizion kun la “ruĝaj plumkomisaroj”. Laŭ li pri liaj verkoj aperis 298 negativaj kaj tri pozitivaj recenzoj, kaj nur la protekto de Stalin helpis lin “eviti morton ne nur certan sed ankaŭ turmentan”.

Sed pri liaj vivo kaj verkoj vi povas legi aliloke, nun ni revenu al nia projekto RuNo-2 por kiu ni elektis kvar verkojn, kies temoj traas la verkaron de Bulgakov.

La ruĝa krono estis verkita dum la laboro pri *La blanka gvardio* kun la sama milita fono, kaj en sia “senfantoma” sonĝo la protagonisto vidas la Bulgakovan familian loĝejon, bildigitan ankaŭ en *La blanka gvardio*. Songĝoj, rimorsoj kaj frenezulejo aperos poste en pluraj verkoj de Bulgakov.

En **La ĥana fajro**, montranta apudmoskvan bienon en la postmilita tempo unuafoje aperas *eksterlandano kaj incendio* (du temoj el MkM) kaj la nova potenculo – figuro satire montrota en MkM kaj en pluraj Bulgakovaj verkoj kaj verketoj, priskribantaj la vivon en la lando de l’ venkinta proletaro.

Ekde septembro 1916 ĝis septembro 1917 Bulgakov laboris kiel zemstva kuracisto en la vilaĝo Nikoljskoje. Sian laboron li priskribis en sep rakontoj, inkluzive de **La blizardo**, kiuj posteume aperis kiel novelaro *Notoj de juna kuracisto*. La kuracista temo ofte aperas ĉe Bulgakov, interalie, en *La hunda koro* (1925), unue publikigita en Sovetunio post pli ol 60 jaroj en 1987 – “la manuskriptoj de forbrulas” (MkM, ĉap. 24).

Estis majo estis planita kiel la unua ĉapitro de la Eŭropa romano de Bulgakov, sed la dua ĉapitro neniam estis verkita, ĉar li ne ricevis la poreksterlandan pasporton. Kaj la tipo de sukcesaj “proletaj” verkistoj kaj kritikistoj, mensogemaj kaj denuncemaj, trovis brilan daŭrigon en MkM kaj en la jam menciita ĉi-jara filmo.

Aleksander Korĵenkov

Miĥail Bulgakov

LA RUĜA KRONO

(Historia morbi)

Plej multe mi malamegas la sunon, laŭtajn homajn voĉojn kaj frapadon. Oftan, oftan frapadon. Mi tiom timegas la homojn, ke, se mi ekaŭdas vespere fremdajn paŝojn kaj voĉojn en la koridoro, mi ĉiam ekkrias. Tial mia ĉambro estas speciala, senbrua kaj la plej bona, en la fina parto de la koridoro, №27. Neniu povas veni al mi. Sed por pli certe sekurigi min mi longe petegis Ivanon Vasiljeviĉ (mi ploris antaŭ li), ke li donu al mi tajpitan legitimaĵon. Li konsentis kaj skribis, ke mi estas sub lia patronado, kaj ke neniu rajtas forpreni min. Sed, verdire, mi ne tre kredis la validecon de lia subskribo. Tiam li devigis ankaŭ la profesoron subskribi kaj metis sur la paperon rondan bluan stampon. Tio estas alia stato. Mi scias multajn ekzemplojn, kiam la homoj restis vivaj nur pro tio, ke en iliaj poŝoj oni trovis papereton kun ronda stampo. Tamen tiun laboriston en Berdjansk¹, kun vango, makulita per fulgo, oni pendumis sur lanterna fosto ĝuste post tio, kiam oni trovis en lia boto ĉifitan papereton kun stampo... Ĝi kaŭzis lian pendumon sur la lanterna fosto, kaj la lanterna fosto kaŭzis mian malsanon (ne maltrankviliĝu, mi tre bone komprenas, ke mi malsanas).

Fakte, ankoraŭ pli frue, ol al Kolja², io okazis al mi. Mi foriris por ne vidi, kiel oni pendumas la homon, sed la timo foriris kune kun mi en miaj tremantaj kruroj. Tiam mi, certe, nenion povis fari, sed nun mi kuraĝe dirus:

– Via generala moŝto, vi estas bestio! Ĉesu pendumi homojn!

Jam pro tio vi povas konvinkiĝi, ke mi ne estas malkuraĝa, mi zorgis pri la stampo ne pro timo de morto. Ho, ne, mi ne timas ĝin. Mi mem mortpafos min, kaj tio baldaŭ okazos, ĉar Kolja gvidos min al despero. Sed mi mem pafos min por ne vidi nek aŭdi Koljan. Sed la penso, ke venos aliaj homoj. Tio estas aĉa.

* * *

Dum tutaj tagoj mi kuŝas sur kuŝbenko kaj rigardas en la fenestron. Super nia verda ĝardeno estas aera profundaĵo, post ĝi flava giganta domego sepetaĝa estas turninta al mi sian blindan senfenestran muron, kaj tuj sub la tegmento estas grandega rusta kvadrato. Reklampanelo: Dentoteknika laboratorio. Blanklitera. Komence mi malamegis ĝin. Poste mi alkitimiĝis, kaj, se oni demetus ĝin, mi verŝajne enuus sen ĝi. Ĝi vidiĝas la tutan tagon, mi koncentras mian atenton sur ĝi

kaj meditas pri multaj gravaĵoj. Sed jen vesperiĝas. La kupolo malheliĝas, la blankaj literoj malaperas el la vido. Mi iĝas griza, mi solviĝas en la makabra densaĵo, samkiel solviĝas miaj pensoj. La krepusko estas terura kaj grava parto de la diurno. Ĉio estingiĝas, ĉio miksiĝas. Rufeta kato ekvagas sur siaj veluraj piedetoj tra la koridoroj, kaj mi fojfoje ekkrias. Sed mi ne permesas ŝalti lumon, ĉar se la lampo eklumos, mi tutan vesperon ploregos tordante miajn brakojn. Preferindas humile atendi tiun minuton, kiam en flueca mallumo eklumos la plej grava, la lasta bildo.

* * *

Mia maljuna patrino diris al mi:

– Mi tiel longe ne vivos. Mi vidas: frenezo. Vi estas pli aĝa, kaj mi scias, ke vi amas lin. Revenigu Koljan. Revenigu. Vi estas pli aĝa.

Mi silentis.

Tiam ŝi metis en siajn vortojn la tutan pasion kaj sian tutan doloron:

– Trovu lin! Vi hipokritas, ke tio estas necesa. Sed mi konas vin. Vi estas saĝa kaj delonge komprenas, ke ĉio ĉi estas frenezo. Venigu lin al mi por unu tago. Nur unu. Mi denove forpermesos lin.

Ŝi mensogis. Ĉu ŝi vere lasus lin foriri?

Mi silentis.

– Mi deziras nur kisi liajn okulojn. Ja tutegale oni murdos lin. Ja estas domaĝe. Li estas mia knabo. Kiun krom vi mi petu? Vi estas pli aĝa. Venigu lin.

Mi ne eltenis kaj diris, deturninte la okulojn:

– Bone.

Sed ŝi kaptis mian manikon kaj turnis min por rigardi al mia vizaĝo.

– Ne, ĵuru, ke vi alveturigis lin vivanta.

Kiel eblas fari tian ĵuron?

Sed mi, senprudenta homo, diris:

– Mi ĵuras.

* * *

La patrino estas malfortanima. Mi forveturis kun tiu penso. Sed mi vidis la oblikv-iĝintan lanternan foston en Berdjansk. Via generala moŝto, mi konsentas, ke mi estis krima ne malpli ol vi, mi treege respondecas pro la homo makulita per fulgo, sed mia frato ne estas kulpa. Li havas dek naŭ jarojn.

Post Berdjansk mi rezolute plenumis la ĵuron kaj trovis lin je dudek verstoj ĉe rivereto. Estis nekutime hela tago. En malklaraj nuboj da blanka polvo sur la vojo al vilaĝo, de kiu disvastiĝis brulodoro, malrapide iris kavaleria kolono. Rande de la unua linio rajdis li, ŝovinte la vizieron sur la okulojn. Mi memoras ĉion: la unua sprono malleviĝis tuj al la kalkanumo. La rimeneto de la kaskedo etendiĝis laŭ la vango sub la mentonon.

– Kolja! Kolja! – mi kriis kaj ekkuris al la vojfosaĵo.

Li tremoris³. En la linio la malgajaj ŝvitaj soldatoj turnis la kapojn.

– Ha, frato! – li responde kriis. Li ial neniam vokis min laŭnome, sed ĉiam – frato. Mi estas pli aĝa ol li je dek jaroj. Kaj li ĉiam atenteme aŭskultis miajn vortojn. – Staru. Staru ĉi tie, – li daŭrigis, – ĉe la arbareto. Ni tuj venos. Mi ne rajtas forlasi la eskadronon.

Ĉe la arbara rando, flanke de la elseliĝinta eskadrono, ni avide fumis. Mi estis trankvila kaj rezoluta. Ĉio estas frenezo. La patrino estis tute prava.

Kaj mi flustris al li:

– Post la reveno el la vilaĝo, vi tuj veturos kun mi en la urbon. Kaj senprokraste de ĉi tie kaj por ĉiam.

– Kial, frato?

– Silentu, – mi diris, – silentu. Mi scias.

La eskadrono surseliĝis, skuiĝis, ektrotis al la nigraj fumnuboj. Kaj eksonis malproksimaj frapoj. Ofta, ofta frapado.

Kio povas okazi dum unu horo? Ili revenos. Kaj mi atendis ĉe la tendo kun ruĝa kruco.

* * *

Post unu horo mi ekvidis lin. Li same trote estis revenanta. Sed sen la eskadrono. Nur du kavalerianoj kun lancoj rajdis ambaŭflanke, kaj unu el ili – la dekstra – ofte kliniĝis al la frato, kvazaŭ fluŝtrante ion al li. Fermetante la okulojn pro sunlumo, mi spektis la strangan maskeradon. Li forveturis en griza kaskedo, sed revenis en la ruĝa. Kaj la tago finiĝis. Aperis nigra ŝildo, sur ĝi la kolora kapvesto. Mankis la haroj kaj mankis la frunto. Anstataŭ ĝi estis ruĝa rubando⁴ kun flavaj dentecaj pecetoj.

La rajdanto – mia frato, en la ruĝa hirta krono – sidis senmove sur la ŝvitega ĉevalo, kaj, se la dekstrulo ne estus zorge subtenanta lin, eblus kompreni, ke li veturas al parado.

La rajdanto estis impona sur la selo, sed li estis blinda kaj muta. Du ruĝaj makuloj kun flustrioj estis tie, kie antaŭ horo brilis la helaj okuloj...

La maldekstra rajdanto elseliĝis, per la maldekstra mano kaptis la kondukilon kaj per la dekstra akurate tiris la manon de Kolja. Tiu ŝanceliĝis.

Kaj sonis la voĉo:

– Ho, nian volontulon⁵... per obusero. Sukuristo, voku la doktoron...

La alia aĥis kaj respondis:

– S-s... Por kio, kamarado, la doktoron? Voku popon.

Post tio nigra vualo iĝis pli densa kaj kovris ĉion, eĉ la kapveston...

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kvar preĝvendredoj

de Paulo Sérgio Viana



Precize je la kvina posttagmeze la sonorilo sonoris. Ho jes! Hodiaŭ estas vendredo! Mi forgesis, sed s-ro Kandel neniam forgesas. Tago kaj horo por trinki bongustan teon. Mi rapidis al la pordo, s-ro Kandel staris sur la trotuaro antaŭ mia ĝardeneto kun la ĉiama rideto, kaj per la ĉiama voĉo sin anoncis laŭ la tradicia demando:

- Ĉu ni teumos hodiaŭ?
- Nepre!

Lasu min klarigi, kiu estas s-ro Kandel. Mia amiko de multaj jaroj, de la tempo, kiam mi instruis al etaj infanoj en publika lernejo. Li estis purigisto en la lernejo, sed fakte li transpasis sian purigan funkcion: li ofte babilis kaj ludis kun la infanoj en liberaj horoj, helpis la instruistojn per etaj ĝentilaĵoj, ofte rakontis fabelojn al la etuloj. Ĉi tiuj gaje ĉirkaŭis lin por aŭskulti, kaj atente sekvis liajn rakontojn. Plej ofte temis pri anĝeloj, mirakloj faritaj de sanktuloj, kaj aliaj mirindaĵoj, kiuj senescepte finiĝis per edifaj moralinstruoj. Kiam li finis, la geknaboj ĉiam petis “unu plian”. Ravaj estis liaj fabeloj. Mi devas honeste konfesi, ke ankaŭ mi kun plezuro aŭskultadis liajn naivajn historiojn sur la korto de la lernejo. Ĝi estis iaspeca primitiva, spontanea teatraĵo. Kaj oni scias, kiel hipnota estas la teatra arto.

Tiel ni fariĝis amikoj. Post kelkaj jaroj li pensiigis, kaj por eviti, ke li malaperu el mia vivo, mi invitis lin trinki teon miahejme unu fojon en ĉiu semajno, kaj tiel formiĝis niaj vendredaj teumadoj antaŭ la vesperiĝo. S-ro Kandel alvenis akurate, en simpla sed eleganta, eksmoda palto kaj bone ciritaj eluzitaj ŝuoj. Preskaŭ formale. Li alportis ĉiufoje po du briketoj da sensukera ĉokolado, kiujn ni frandis kun la teo. De li mi konfirmis la impreson, ke tradiciaj, eĉ iom rigidaj kutimoj inter amikoj eble aspektas strangetaj, sed funkcias kiel ritoj, kiuj helpas plifortigi la ligon inter du homoj el tute malsamaj universoj. Nia teumado nur tre escepte ne okazis, se vere intervenis seriozaj kialoj. Amikeco postulas konstantecon.

S-ro Kandel estis religiema. Malalta, malgrasa, konsistanta preskaŭ nur el ostoj, haŭto kaj fervora animo. Liaj vizaĝtraĵoj estis angulecaj kaj sekaj, iom palaj, kun malgrandaj okuloj konstante palpebrumantaj kaj larmetantaj. Ŝajnis, ke li senĉese

priploras la mondon. Lia voĉo sonis mallaŭte kaj iom raŭke, malfirme, kaj plifortiĝis nur kiam li rakontis unu el siaj fabeloj. Mi hodiaŭ pensas, ke li estis preskaŭ anĝelo, certe taŭga figuro por iu fabelo. Nun li jam kompletigis sian naŭdekjaran aĝon, sed ĉiusemajne li plu alvenis piede al nia teumado.

Ni babiladis pri plej variaj aferoj: pri la blua hodiaŭa ĉielo, pri la kriĉado de la papagetoj sur la urbaj arboj, pri tukano, kiun li vidis rande de tegmento, pri vagantaj malsatantaj hundoj, kiujn li trovadis surstrate. (Li ĉiam havis en la poŝo panpecojn por regali la kompatindulojn, kiuj kutime sekvis lin surstrate.) S-ro Kandel nenion sciis pri la funkciado de la mondo, sed bone komprenis la hundojn kaj la birdojn. Nur sporade li menciis iun homon. Al mi liaj temoj plaĉis, ĉar nia babilado efikis kiel ripozo for de la mondaj tumultoj.

Li restis en mia hejmo apenaŭ kelkajn minutojn. Li maĉis sian ĉokoladon, englutis sian teon kaj baldaŭ stariĝis, eldirante la ŝlosilan frazon:

– La teo hodiaŭ estas speciale bongusta!

Kaj mi tradicie reagis:

– Same la ĉokolado!

Kaj ni ambaŭ ridetis per nia sekreta, ekskluziva interkonsento.

Evidente li timis ĝeni sian amikon per tro longa vizito. Iam kaj iam, por iom prokrastigi lian adiaŭon, mi petis lin ripeti unu el siaj fabeloj, rakontitaj al niaj lernejanaroj, antaŭ pluraj jaroj. Ĉi tion li ja akceptis kun brilo sur la okuloj.

Por la hodiaŭa teumado mi akceptis mian maljunan amikon lamante. Mi malfermis al li la pordon, kaj li tuj rimarkis, ke mi misfartas.

– Kio okazis al vi, junulo?

– Lumbodoloro, mia kara. Fakte mi jam ne estas tiel juna, kiel vi supozas. De kelkaj monatoj atakas min ĝena doloro je la malsupra parto de la vertebraro. Kva-zaŭ mi suferis bastonadon. (Fakte, la vivo foje bastonas nin, ĉu ne?) Ĝena afero, kiu igas min lami mizere. Sed ne zorgu, mi ne mortos tre baldaŭ, mi supozas.

S-ro Kandel enpensiĝis, silente, dum momento.

– Mi solvos tion!

– Ĉu vi?!

– Jes. Mi konas specialan preĝadon, kiu nepre resanigos vin.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Romio antaŭ Julio

Shakespeare, William. *Koriolano: Tragedio / Tradukis el la angla Marjorie Boulton, Humphrey Tonkin; enkonduko kaj notoj de Humphrey Tonkin.* – Barlastono: Esperanto-Asocio de Britio, 2023. – 217 p.


La titolo, kalemburante kun la nomoj Romeo kaj Julieta, evidente manifestas mian obsediĝon pri vortludoj. Mi solene ĵuras ke tio estas la lasta kalemburo de la tuta recenzo. Sed mi konfesu, ke, kiel kutime en miaj tekstoj, ankaŭ sur tiu ĉi vortludo rajdas unu-du ideoj petantaj vian seriozan atenton.

Inter la romiaj teatraĵoj de Ŝekspiro *Koriolano* ne vere situas en tiu Romio, kiun nia epoko konas kaj ofte preparolas. Por ni, vivantaj dumil jarojn poste, la etikedo Romio kutime nomas tiun stabilan imperion, kiun Aŭgusto Cezaro efike regis dum kvardeko da jaroj (de 27 a.n.e. ĝis 19 n.e.), kaj kies sojlon markis la murdo de Julio Cezaro.

Sufiĉe ofte ni aŭdas pri la aventuroj de romianoj en Kartago, en la grekaj insuloj, en Egiptujo. Sed tiaj rakontoj lasas nin sensciaj pri la epoko, en kiu Romio eĉ ne regis la tutan teritorion de la nuna Italujo. En tiu praepoko, Romio intermite skermadis kontraŭ la rivala regno Volcio, provante ampleksigi sian terenon. Ni devas viziti tiun praltalujon por retrovi la eventojn kiuj inspiris la ŝekspiran teatraĵon *Coriolanus*.

Jam sojle al la nun celebrata centjariĝo de Marjorie Boulton, posteume aperis ĝia esperantigo *Koriolano*. Feliĉe por Esperantujo, duone preta traduko de tiu verko estis trovita inter ŝiaj postlasitaj manuskriptoj sufiĉe frue por ke nia ŝekspirologo kaj beletra-traduka korifeo Humphrey Tonkin povu kompletigi kaj poluri la malneton, por ke Esperanto-Asocio de Britio sukcesu fulmrapide ĝin aperigi, kaj por ke eĉ malrapida laboranto trafu recenzi ĝin antaŭ ol la jubilea jaro de Boulton fuĝos el la kalendaro.

Teme de kronologioj, respektive en 1906 kaj 1947 aperis la esperantigoj *Julio Cezaro* (tr. Daniel Henry Lambert, Brita Esperantista Asocio, Londono) kaj *Antonio kaj Kleopatro* (tr. Stephen A. Andrew, The Esperanto Publishing Company, Rickmansworth). Ili nin portis al la klasika Romio. La sinsekvo de tradukoj en Esperanton mirinde paŭzas la itineron de Ŝekspiro mem: *Julius Caesar*, 1599; *Antony and Cleopatra*, 1607; *Coriolanus*, 1608. Ni ĉesu prefaci; ek al pra-Italujo!



Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humuristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

Aĥ, tiuj malriĉuloj

– Kiam mi estis juna, – rakontas maljunulo, – mi estis tre malriĉa. Mi longe kaj persiste laboris dum mia tuta vivon...

– Kaj?

– Kaj nun mi ne plu estas juna.

Kiel funkcias ekonomiaj rilatoj en kulturo? Operon faras riĉuloj por riĉuloj. Kinon faras riĉuloj por malriĉuloj. Teatron faras malriĉuloj por riĉuloj. Memeojn en Interreto faras malriĉuloj por malriĉuloj.

Miliardulo metis sian bankan karton en bankmaŝinon, kaj en la ekrano aperis informo: “Malsufiĉas mono”. La miliardulo enpensiĝis: “Ĉu malsufiĉas mono al mi aŭ al la banko?”

Ĵurnalisto demandas riĉan politikiston kiel li sukcesis riĉiĝi.

– Mi ĝuste elektis prioritatojn en diversaj etapoj de mia vivo.

– Kiel tio helpis?

– Ne eblas samtempe esti riĉa kaj honesta, do unue mi iĝis riĉa kaj poste honesta.

Junulo demandas junulinon:

– Ĉu vi pretus edziniĝi al riĉa idioto?

– Ĉu vi subite riĉiĝis aŭ nur scivolas?

Du malriĉuloj babilas:

– Mi dezirus trafi en la dekon da plej riĉaj politikistoj...

– Sed kiel?

– Prefere per mitralo.

Kiam virinoj diras, ke la plej aprezinga en la viro estas humursento, tio signifas ke riĉa kaj bela viro devas foje ankaŭ ŝerci.

Studento venas al prezidanto de banko:

– Kredu min, por mi tute ne gravas viaj riĉeco, domoj, ebleco doni al mi altan postenon ktp. Mi simple amas vian filinon kaj pretas edzinigi ŝin tuj.

– Sed kiun el tri miaj filinoj vi deziras edzinigi?

– Lun ajn!

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Unu homa viv'

Ni anoncas kun granda malĝojo la morton de nia kara, longdaŭra samideano...
(*Esperanto*, 2024, №5, p. 119)

Monomanie en Urugvajo, aŭ: La Monavida venko?

Sepdek jaroj depost la triumfo de Monevideo. (EKO, 2024, №24; rimarkis Valentin Melnikov)

Ĉu azeno aŭ ĉevalo?

Post la intervjuo... kun Łukasz Żebrowski, Tobiasz Kubisiowski estas la ekva esperantisto, invitita al Pola Radio RDC. (*Pola Esperantisto*, 2022 №4, p 10)

Ni iru la vojon ĉelitan

nova lernolibto /tiele/ pri la sŭahila en esperanto... baldaŭ ĉe la litservo de UEA.
(Renato Corsetti, 2 apr 2024, <https://groups.io/g/uea-membroj/topic/105290282>)

Vivon ŝi havis ian

Jan ZEMEK (1895-1960) estis ... La ĉefa inspirinto de poetino Eli Urbanová, por kiu li, kvankam multe pli aĝa, signifis kulminon de ia vivo. ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Jan_Zemek_\(esperantisto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Jan_Zemek_(esperantisto)))

Malaligu la vualon!

Proksime al la restoracio estis starigita memorŝtono nun senvalualigota. (Röllinger H. *Monumente pri Esperanto*. Rotterdam: UEA, 1997, p. 89.)

Hato aŭ ŝato, gravas por ŝtato

Ni parolis kun Israelano Dror Gaon pri la historio kiel ekestis la nuna situacio de Israelo. Komencante antaŭ la cionismo de la 19a jarcento, preterirante du mondmilitojn ĝis la fondiĝo de la nuna ŝtato Israelo en 1948. (<https://kern.punkto.info/2018/08/09/kp142-israelo>; trovis Laurent Ramette)

Ronĝuloj ĉie

Li plue skribas pri la Deklaracio de Homaj Ratoj de 1948... (Lapenna B. *La du konceptoj de Ivo Lapenna: "Aktiva Neŭtraleco" kaj "Humaneca Internaciismo"*, <https://www.ivolapenna.org/historiegravaj/bogota.htm>)

Lastatempe usona Ŝtata Departemento publikigis "Landajn Raportojn pri Homaj Ratoj 2017" (<http://esperanto.cri.cn/2521/2018/04/24/241s198663.htm>)

Plukis **István Ertl**

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Ĝi estas demonstra versio de la 136-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>